

FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO

Organo de FRANCA LIGO DE KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ, filio de IKUE

Redaktoro : S-ro Gaston VERON, pl. de la Petite Bruyère, DOMFRONT (Orne)
Sekretariino : F-ino J. LE BOEDEC, 18, rue Ernest Cresson, PARIS 14-
Kasisto : S-ro J. LIGOT, 30, rue Fernand Segouin, ARNOUVILLE-LES-GONESSE
C.C.P.- PARIS - 51 74 79 - (Seine-et-Oise)

Abonnement : 2 Fr.- Adhésion à la Ligue : 1 Fr -, Total = 3 Fr 00 .-

N° 59 - BULLETIN TRIMESTRIEL - TRIMONATA BULTENO -
- Oktobro 1963.-
Sankta Pio X, preĝu por ni .

E S P E R O

=====

El la profeto Jeĥezkel : (XXXIV - 11,12-)

.... Car tiele diras la Sinjoro, la Eternulo : Jen Mi venos, kaj Mi serĉos Miajn ŝafojn kaj esploros ilin. Kiel paŝtisto esploras sian ŝafaron, kiam li alvenas al siaj diskurintaj ŝafaron, tiel Mi esploros Miajn ŝafojn; kaj Mi savos ilin el ĉiuj lokoj, kien ili diskuris en la tago nuba kaj malluma....

El la evangelio laŭ Sta Johano, X, 11/14-27/29-

.... Mi estas la bona paŝtisto; la bona paŝtisto demetas sian vivon por la ŝafoj. La dungito, kaj tiu, kiu ne estas paŝtisto, kies propraĵo la ŝafoj ne estas, ekvidas la lupon venanta kaj lasas la ŝafojn kaj forkuras; kaj la lupo ilin kaptas kaj dispelas; li forkuras tial, ke li estas dungito kaj ne zorgas pri la ŝafoj. Mi estas la bona paŝtisto, kaj mi konas la miajn, kaj la miaj min konas.....

..... Miaj ŝafoj aŭskultas mian voĉon, kaj mi ilin konas, kaj ili min sekvas; kaj mi donas al ili eternan vivon; kaj ili neniam pereos, kaj neniu ilin forkaptos el mia mano. Mia Patro, kiu donis ilin al mi, superas ĉion; kaj neniu povas ion forkapti el la mano de mia Patro....

PAPAJ VORTOJ .

... Kristanismo ne estas tiu tutaĵo de trudadoj, pri kiuj senpropense parolas tiu, kiu ne havas kredon, sed ĝi estas paco, ĝi estas ĝojo, ĝi estas amo, ĝi estas vivo ĉiam renoviĝanta, kiel la sekreta naturkreskado komence de la printempo....

(Johano la XXIII-a, Paska Mesaĝo, 1959)

La mesaĝo de Jesuo, nia Savanto, estis fakto ĝojanenco; ĝi estis la ĝoja sciigo, kaj plenerarus tiu, kiu imagus, kiel multaj pensuloj kaj poetoj de la pasintaj tempoj, ke kristanismo estas io funebreca kaj trista. Ne, kristanismo estas ĝojo; ĝojo en ordo kaj paco kun Dio kaj la proksimulo Serĉu ĝojon, kunportante ĉien iom da sincereco, da praveco, evitante ĉion, kio estas mensogo aŭ simulado, por ke, el via vivo, ŝprucu senhalta ondo de elfontiĝanta akvo, kiu altiĝados ĝis la eterna vivo.

1958

(Johano la XXXIII-a, Aŭdienco de la 18a de Decembro

Oni multe parolis pri la famkonata pentraĵo de Leonardi da Vinci, sed ĉu vi scias, ke pro tiu bela Joconde la poeto Apollinaire iris en malliberejon ? Estas kurioza historio, kiu rakontis Paulette Houdyer en la revuo "La Vie Mancellle". Jen la faktoj :

En 1907, Apollinaire kompateme gastigis malfeliĉulon nomatan Guy Pieret, kiu okaze deĵoris kiel sekretario. Tiu viro - pli frenezulo ol ŝtelisto - ŝtelis en la muzeo Louvre du hispano-romajn statuojn kaj vendis ilin al unu el la plej bonaj amikoj de Apollinaire. Li estis pentristo, kies nomo oni neniam indikis kaj la poeto en siaj leteroj nomas lin X....

Apollinaire rekontas, ke li klopodis persvadi sian amikon, ke li redonu la statuojn : pro simpla honesteco, ĉar la statuojn oni ŝtelis kaj S-ro X sciis tion; pro singardemo ankaŭ, ĉar li estus akusata pro ricelado, se la enketo malkaŝus la aferon. Sed vane, S-ro X deziris konservi la statuojn.

Kvar jaroj forpasas kaj Pieret revenas el Ameriko, kien li forkuris. Li estas riĉa sed vetludas je la ĉevalkurado kaj baldaŭ estas sen mono. Denove li ŝtelas alian statuon kaj sen loĝejo vizitas Apollinaire'n, kies bonkorecon li konas. Li konfesas la ŝteladon sed tiufoje la poeto koleriĝas kaj postulas kondiĉon por akcepti la gaston : li tuj redonu la statuon, sed Pieret rifuzas. Apollinaire forpelas lin kune kun la rabaĵo.

Post tio, oni ŝtelas la Joconde-pentraĵon. Pieret ne estis la kulpulo sed oni komprenas, ke Apollinaire kredas tion. Cetere li ne estas la sola : la polico suspektis, ke Pieret estis la ŝtelanto de la du ŝtelaj en 1907; ĝi faris komparadon. Pieret iomete maltrankvila decidis forvendi la statuon; li portas ĝin al la ĵurnalo Paris-Journal, kiu aĉetas ĝin kaj redonas al la muzeo, skandalete anoncanta la novaĵon. La ĵurnala gazetaro komentas al aferon.

Apollinaire timiĝas, ne por si. Li ne pensas pri si sed pri sia amiko. Li scias, ke la polica enketo kondukos fine al la ricelanto. Li do iras ĉe S-ro X, malfermas liajn okulojn pri lia malhonesteco kaj obtenas, ke li portos la du ŝtelitajn statuojn al Paris-Journal. Sed tri statuoj redonitaj unu post la alia, tio estas tro multe : Eksplodas skandalo : la ŝtelisto havis kunkulpulon. Sed kiun ?

Pieret ektimas kaj kuras petegi Apollinaire'n por helpo. La poteco, ĉiam grandanima, kompatas tiun frenezulon, donacas al li monon kaj forkurigas lin, kondukante mem al la stacidomo. La polico ekscias tion. Por ĝi, la konkludo estas evidenta : Apollinaire partoprenis la tri ŝteladojn; li scias, kie estas la pentraĵo Joconde. Oni arestas lin.

La poliestro pridemandas lin kaj li konfesas, ke Pieret estis lia sekretario sed nenio pli. Li rifuzas liveri lin. Oni daŭrigas la pridemandon dum pluraj horoj kaj oni vane manacas la poeton. La afero alvenas antaŭ la juĝisto pri kriminalaj enketoj, kiu decidis konfronti la du homojn. S-ro X estas kunvokita. Li venas kaj flue parolas per indignaj vortoj. Kiel ? Pri kio oni akuzas lin ? Sed li komprenas nenion pri tio ĉi ! Li scias nepre nenion en tiu afero ! Li malkonfesas ĉion; li konfesas nur ke li estas la amiko de la poeto.

Apollinaire konsternegiginta pensas, ke li estas nesavebla kaj fakte li estus tia sen la sagaceco de la juĝisto, kiu ekkonas la homojn kaj estis impresita de la sincereco de la akuzaro. Li komprenas, ke la poeto estis la viktimo de la cirkonstancoj kaj arestita precipe, ĉar li ofendis la poliestron per silento, kaj fine ke indigna amiko akuzas lin, kiam li povus senkulpi lin. En unu vorto li permesas, ke Apollinaire pridemandu S-ron X en lia ĉeesto. Kaj S-ro X konfesas la aferon, sed li sukcese elturniĝos, ĉar oni neniam prononcos lian nomon. Kontraŭe la poeto profitis senkulpigan pardonon sed lia reputacio estis tamen makulita.

(Laŭ revuo "La Vie Mancellle" resumis K...)

- PRI FAMALIAJ NOMOJ -

Mia alvoko pri tiu temo havigis al mi du respondojn : unu de Parizo, unu de Nederlando. Dankon al la afablaj respondintoj.

La hodiaŭa artikolo konigu la nunan rezulton de kvinjara enketado, kiu igis min trafolumi multe da paĝoj en la repertorioj de la parizaj nctarioj de la 17-a kaj 18-a jarcentoj.

Ni preterlasu la 42 nomojn de preĝejaj kantistoj, aŭ kantoroj, kiujn citas Dauzat en sia grava verko "Etimologia vortaro de la familiaj nomoj en Francujo".

Jen do mia propra aldona listo :

1)- Ankoraŭ ekzistantaj nomoj :
APPARUIT (Orienta Francujo), DIXIMUS, FIAT, GENUIT, GRATIAS, HIC, MANUIT, MORIETUR (Norda Francujo), OREMUS (Nederlando), PAUPER, RADIX, SANCTORUM, (Norda Francujo kaj Belgujo), SECUA, VELOCITER.

2)-Nomoj trovitaj en la 18-a aŭ 17-a jarcento :
HODIE, LAUDA, OREMUS, (jam citita), REQUIEM.

3)- Dubaj nomoj :
LUX, (Dauzat proponas alian devenon), COELI, kaj DOMINI (francaj aŭ italaj)
POPULORUM (Aŭstrujo), SPIRITUS, SUBITO, TIBY (ĉu TIBI?), TANTON (ĉu iam TANTUM ?) .

Eble iu el la legantoj povos plilongigi mian liston, aŭ precizi provincon, aŭ helpi min altigi nomon de la 2-a aŭ 3-a kategorio al la 1-a.

Denove, mi alvokas ;

Skribu al : S-ro X. DAUCHEZ, 21, Grande Rue, EPINAY-SUR-ORGE (Seine-et-Oise) Francujo.

.....

La anoncita IKUE-Kolekto "Kristana Kulturo" ĵus eliris el la presejo; la unua kajero estas dediĉita al la pioniro de la katolika movado Emile Peltier.

Ni rekomendas al vi ĝin legi kaj vi povas mendi al S-ro MUFFANG, la broŝuro : 2 fr 50.-

.....

COTISATIONS 1964

La rentrée est la période où les espérantistes réglent d'habitude leurs cotisations. Nous nous permettons donc de vous en rappeler les taux et de vous demander d'en payer le montant le plus rapidement possible. Vous rendrez service au trésorier et d'avance nous vous en remercions.

Ligue Française espérantiste catholique :

Cotisation normale : 3 Fr

Pour les moins de 21 ans : 2 fr

A envoyer à Mr J. LIGOT, CCP. PARIS 51 74 79-

IKUE - Espero Katolika : membre abonné : 9 Fr 75

à envoyer à : Mr. MUFFANG, CCP - PARIS 224-82--

Vojo-Vero-Vivo : 3 Fr, à envoyer à Mr. VERON, CCP - ROUEN 1188-63-

=====

Dépôt légal : 4° trimestre 1963

Polycopié par : F.M.C.

Papier de presse : N° 34.745-

Prieuré Saint-Martin
LA HOUSSAYE EN BRIE

(Seine-et-Marne)

Directeur de la Fédération : Mr. G. VERON à DOMFRONT (Orne)

!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!

UNE DATE A RETENIR :

Il n'est pas besoin de rappeler à nos lecteurs les liens fraternels qui nous unissent aux Frères Missionnaires des Campagnes.

Nous invitons donc tous nos membres parisiens à venir nombreux à la vente de charité que les Amis des Frères Missionnaires des Campagnes organiseront, le Mercredi 13 Novembre 1963, (-de 9 h à 20 h.) à l'Hôtel Lutétia, 43 Boulevard Raspail, Paris 6°. (métro : Sévres-Babylone). Ils aideront ainsi ceux qui nous ont déjà si aimablement accueilli dans leur Prieuré de La Houssaye-en-Brie.

+++++